



Nordgermana Heroldo

En ĉi tiu numero

Baza ŝtata alimentado

Ĝenerala Datum-Protekta Regularo



N^o 2 – Julio 2018

Enhavo

Enhavo	2
Ĉeftemo	4
Baza ŝtata alimentado.....	4
Kuklando.....	12
La svisa eksperimento	14
La finnlanda eksperimento.....	15
Tutmonde.....	17
C. Louis Kervran kaj biologiaj transmutacioj.....	17
Gustav Holst, komponisto	21
El la movado.....	23
La revuo MONATO.....	23
La kastelo GREZILJONO.....	24
Monda premiero de opero en Esperanto en Ĉeĥa Nacia Teatro	25
Norddeutscher Bote	26
Datenschutz-Grundverordnung (DSGVO).....	26
R. I. P. ŜHELO.....	34
Mortis Marga Spittler	35

Leterkesto	36
Pri »Vagas fantomoj«.....	36
Pri »Forgesitaj libroj«.....	37
Ipernity blokita en Ruslando	38
El la redakcio	39
Ĝenerale	39
Ni ricevis	42
Glosaro / Glossar	44
Kolofono / Impressum	45

Ĉeftemo

Baza ŝtata alimentado

Ekzistas ideo kaj proponoj pri baza salajro, pensio aŭ porcivitana subvencio aŭ, laŭ la titolo de la artikolo, baza ŝtata alimentado.

La nocio

Temas pri mono, kiun la ŝtato donas regule al ĉiu civitano. Estas malfacile trovi taŭgan nocion. En Germanio oni parolas pri *bedingungsloses Grundeinkommen* (senkondiĉaj bazaj enspezoj) aŭ *Bürgerrente* (civitana pensio aŭ ĉiespensio). Esence tio estas ŝtata alimentado por la loĝantoj aŭ civitanoj.

Laŭ mi tio ne estas enspezoj, ĉar *enspezoj* tradicie estiĝas el laboro, komercado aŭ aliaj negocoj. La donacado de mono por vivtenado estas *alimentado*.

La historio

La ideo de alimentado ne estas nova. Tute male. Ĉiu socio havis kaj havas sian formon de alimentado de malfortuloj, malsanuloj kaj malriĉuloj. Onidire iam en la tempo de la Roma Imperio (jes, *Roma*, ne *Romia*) libera civitano de Romo ne laboris. Laborado estis tasko de sklavo, sed komercisto, metiisto aŭ bienulo neniam laboris mem.

Tamen ja estis homoj, kiuj ne havis negocon nek bienon nek sklavon. Kiel ili vivtenis sin? La respondo estas »panem et circenses«, pano kaj cirkoludoj. En la grandaj Romaj arenoj oni ne nur prezentis teatraĵojn, batalojn de gladiatoroj kaj buĉadon de bestoj kaj sklavoj, sed ankaŭ disdonis panon kaj aliajn nutraĵojn. Tiu sistemo funkciis nur sub la kondiĉo, ke estas sufica nombro da sklavoj.

Situacio en Germanio

En Germanio senlaboruloj ricevas por certa tempo monon el la senlaborula asekuro kaj post tio »Senlaborulan monon 2«, konatan ankaŭ kiel »Hartz IV«. Kiu ial perdas tiun subvencion, devas vivi el »socia helpo«, tio estas baza ŝtata alimento.

Specialan atenton meritas la provizado per medicina helpo kaj sanigaj servoj. En ŝtatoj, kiuj pagas sanservadon per impost-enspezoj, unuopulo kutime ne kontribuas rekte al ĝi. En Germanio ekzistas sanasekuraj asocioj, al kiuj kaj la firmao kaj la dungito pagas el la salajro. Vi povas facile vidi, ke tuj leviĝas demando: Ĉu la pagoj por la sansekuro estas parto de la baza salajro, aŭ ĉu tiu mono estas ekstra? Sama demando estas pri la deviga pago por la publikaj (kvazaŭŝtataj) radio- kaj televidaj institucioj.

Aktualaj proponoj

Oni parolas pri *senkondiĉa* alimentado, kio signifas, ke ĉiu monate ricevas sumon senkondiĉe, ĉu li havas laboron kaj

propran kapitalon aŭ ne. Mia demando: Ĉu senkondiĉan alimenton ricevas ankaŭ milionuloj kaj miliarduloj, do ekzemple sinjoro Piëch (kunposedanto de VW, Porsche) kaj la familio Quandt (kunposedantoj de BMW)? Ĉar la senkondiĉa alimento estas **senkondiĉa**, la respondo devas esti: Jes.

Dua formo estas *solidara salajrado*. Homoj, kiuj dum longa tempo estis sen laboro, faru simplajn, facilajn laborojn por la *komunumo* aŭ la *socio* kaj tial ricevu salajron anstataŭ alimenton.

Danĝeroj de alimentado

Kia estos la homo, kiu dum sia tuta vivo de la naskiĝo ĝis la morto dependas de ŝtata mono? Ĉu li estos memstara, memkonscia, laborema, kreema? Mi treege dubas pri tio, kaj aŭdacas diri, ke la spertoj pri ricevcantoj de »Hartz IV« (senlaborulo mono 2) montras, ke la homoj adaptiĝas al la cirkonstancoj. Alimentatoj aranĝas sin laŭ la eblecoj, kiujn la alimento donas al ili. Multaj el ili ja vivas en subsocio de samsortanoj. La alimentato estos marioneto, kiu dancas laŭ la deziroj de la mondonanto, do la ŝtato. Aŭ – el alia vidpunkto, alimentata balotanto donos sian voĉon al tiu, kiu promesas plej altan monan subvencion post la balotado. Bela estonteco!

Kaj kompreneble, kiam (jes, *kiam*, ne *se*) kolapsos ekonomio, kiu donacas la vivrimedojn ne nur al malfortuloj, maljunuloj kaj malsanuloj, sed ankaŭ al laborpovaj, sed ne

laborvolaj personoj? Ĉu VI nun respondas, ke ne ekzistas tiaj?

Ju pli da mono la ŝtato elŝutas por pure socialaj celoj sen kontraŭvaloro en formo de laboro kaj servoj, des pli oni pelas inflacion: Oni havas tro da mono kaj maltro da varoj. Sekve la varoj plikostiĝas, kaj oni devas pligrandigi la alimentan monon. La ekonomio kolapsas: Tro malmultaj homoj produktas varojn, sed estas multo da mono por aĉeti (ja ne ekzistantajn) varojn.

Se ĉiu civitano ricevus bazan alimenton, kial la labordonanto (firmao) pagus tradician salajron? Ĉu ne estus konsekvenco, ke la salajro estus malgrandigita per la sumo de la baza alimento? Malalta salajro signifus malaltajn impostojn – kaj ho!, denove mankus ŝtatoj enspezoj rezulte de impostoj, el kiu ĝi devus pagi la alimenton.

Mono

Kio estas mono? Kiel estiĝas mono? La klasika respondo (unu el multaj) estas, ke mono estiĝas el laboro. La homo laboras, kaj la rezulto de lia laboro havas pli grandan valoron ol la rimedoj, kiujn la homo uzis. Tiun valoron oni esprimas per mono. Samtempe mono estas interŝanĝilo, mi interŝangas varojn kontraŭ samvalora mono. (Alia opinio diras, la moderna mono estas nur nombroj en komputeroj. Tio signifas, ke mankas rilato inter mono kaj produktitajôj.)

La esenco: La bazo de nia socio ne estas **mono**, sed la kreado de novaj valoroj en formo de varoj kaj servoj. Tiuj

havas *valorkopion*, kaj tio estas mono. Tial laboro estas grava por la socio. Ĝi generas la valoraĵojn, el kiuj oni poste disdonas parton kiel bonfaraĵon al la jam nomita grupo de socialaj malfortuloj: malsanuloj, handikapuloj, infanoj, maljunuloj kaj tiel plu. Estas evidente: Ju pli da homoj laboras kaj plialtigas la generitan stokon da valoraĵoj, des pli da malfortuloj oni povas subvencii – aŭ des pli altan subvencion oni povas doni.

Sed kio okazas, se homoj ricevas altan ŝtatan alimentadon? Fakte ili estus sufiĉe stultaj, se ili plu laborus respektive laborus en fabriko.

Ili faras, kion ili volas (sendepende, ĉu ili generas valoraĵojn, kaj ĉu la laboro estas senchava kaj utila), aŭ ili tute ne laboras, sed iras al la cirkoludoj en televido. Ne estas problemoj, se temas pri malgranda grupo da homoj. Se tiu grupo trograndiĝas, tiam la sistemo kolapsas, ĉar malmultaj laborantaj homoj ne povas generi la valoraĵojn por multaj nelaborantaj, alimentataj homoj.

Eble ni havus grandajn bazarojn kun mempentritaj bildoj kaj memfaritaj potaĵoj. Certe mankas komputeroj aŭ insulino por diabetuloj, ĉar tiujn oni devas produkti fabrike kaj ne laŭplaĉe.

Ĉiuj belaj kaj bonaj ideoj pri ĉiespensio ĝenerale estas pura teorio. En realeco estas demandoj, kies respondojn oni lerte evitas dum teoria diskutado. Ekzemple: Kiu ricevas la alimenton?

- germanaj ŝtatanoj vivantaj kaj laborantaj en eksterlando?
- eksterlandanoj vivantaj kaj / aŭ laborantaj en Germanio? Ekzistas homoj, kiuj vivas en unu lando, laboras en alia kaj ĉiutage veturas translimen.
- EU-ŝtatanoj vivantaj, sed ne laborantaj en Germanio?
- Post kiom da jaroj persono, kiu ne estas germana ŝtatano, sed vivas ĉi tie, havas rajton je la alimento?

Tiuj demandoj devas esti parto de la projekto dekomence. Oni ne solvos tiujn punktojn **post** la enkonduko de ŝtata alimentado.

Propono

Tamen, ankaŭ mi jam dek kvin jarojn meditas pri ĉiespensio. La unua regulo estas: Ĝi anstataŭas ĉiujn aliajn enspezojn kiel senlaborulan monon, malsanulan monon, pension, krompagon por infanoj (Kindergeld) kaj tiel plu. Mi donus al ĉiu persono 600 eŭrojn. Pri ĉu tiu nombro oni ne devas disputi, ĉar tio ja estas ideo. Vi povas proponi 900, 1200 aŭ 5000 eŭrojn, tio ne ŝanĝas la principon.

Infanoj ĝis dek du aŭ dek kvar jaroj ricevas kvaronan sumon, gejunuloj ĝis dek ok jaroj duonan.

Po dek laborjaroj plialtigas la civitanan pension je kvarono. Post kvardek laborjaroj vi do havos (ekzemple) monatan pension de 1200 eŭroj. Se vi pensas, ke tiu sumo

ne sufiĉos, vi povas fari privatatan aŭ firmaan asekuron ĉu por malsanula mono ĉu por maljunula pensio.

Do se vi ne laboras, vi havas tiun monatan sumo je via dispono (*vivtena mono*). Se vi havas laborpostenon kaj enspezas salajron, tiam vi devas repagi duonon de via salajro al la ŝtato, sed neniam pli ol la ricevitan ĉiespension.

Ni kalkulu kelkan konkretajn nombrojn.

Vi ricevas salajron de 100 eŭroj. El tiuj vi repagas duonon, do 50 eŭrojn, al la ŝtato (kaso de ĉiespension). Vi vivas per 650 eŭroj.

Vi ricevas salajron de 400 eŭroj. El tiuj vi repagas duonon, do 200 eŭrojn, al la ŝtato. Vi vivas per 800 eŭroj.

Vi ricevas salajron de 1200 eŭroj. El tiuj vi repagas duonon, do 600 eŭrojn, al la ŝtato. Vi vivas per 1200 eŭroj. Se via salajro superas duoblon de la pensio, la tuta salajro estas via. Vi ne pagas enspez-imposton.

Nur super tiu sumo de 1200 eŭroj vi pagas enspez-imposton, ekzemple 20%. Ni kalkulu:

Vi ricevas salajron de 2000 eŭroj. Pensio kaj repago de pensio estas 600 eŭroj, do la tuta salajro estas via, vi fakte ne repagas pensian porcion. Via salajro superas la limon de 1200 eŭroj, tial vi devas pagi imposton por la diferenco inter 1200 kaj 2000 eŭroj, tio estas 800 eŭroj. Via enspez-imposto estas 20% de 800 eŭroj, do 160 eŭroj. Vi vivas per 1840 eŭroj.

La avantaĝoj de ĉi tiu propono estas

- Homo, ricevanta salajron el laboro, ĉiam havas pli da mono por vivtenado ol homo, kiu ne laboras.
- Parto de mono elspezita por la ĉiespensio refluas en la kason de la ŝtato.
- Nur homoj kun malaltaj salajroj ĝuas la bonfarojn de la pensio.
- Tempo de laborado plialtigas la pension.

Tio estas laŭ mia opinio sufiĉe simpla kaj racia sistemo. Tio estas garantio, ke ĝi neniam estos realigata en Germanio.

MLe (ĉ. 1400 vortoj)

Kuklando

Ĉu vi ŝatus vivi en Kuklando (Slaraffenland, Schlaraffenland, Cockaigne, País de Cucaña, Pays de Cocagne, Paese di Cuccagna, Luilekkerland, Kukania, Шлараффенланд, Kekalän...)? Mi ne povas imagi vivon sen fari ion senchavan. Post enkonduko de baza enspezo la homoj certe plu laboros, ĉu kontraŭ mono ĉu senpage. La nuna devo pagite labori por havi la rajton ekzisti estas kontraŭ la homa digno en epoko de klerismo. Mezuri la valoron de laboro per mono ne estas socie justa. Ni nur alkutimiĝis al la ideo, ke laboro estas nur vera laboro, se ĝi donas profiton (al kiu?) kaj ne plezuron. Tamen estas kelkaj homoj, kiu bonŝancas fari el ŝatokupo profesion. Ilin ni envias, ĉar ni devas de la dungagentejo en dubo akcepti laboron, kiu eĉ malhelpas al homoj, ekzemple telefonakirado de klientoj per fraŭdaj manieroj. Ni ne havas rajton je laboro, la ŝtato postulas akcepti iun ajn laboron - do estas devo de laboro.

Baza enspezo ne estos donaco al la homoj. Maŝinoj kaj la ilin farintaj homoj ĉiaokaze laboras sufiĉe por ke ĉiu povu digne vivi; estas nur la demando, kien iras la perlaborata riĉeco kaj laŭ kiuj kriterioj ĝi estu disdonata. Necesas de la ŝtato postuli regulojn laŭ kiuj ĉiuj homoj ricevu tion je kio ili rajtas. Ni devas evolui ideojn, kiel ni volas vivi en 20 jaroj kaj ilin porti al la politikaj partioj.

Paralele eblas evolui ekzemplodonajn projektojn. Ekzemple ekzistas en Germanio societo (ligilo vidu malsupre), kiu kolektas monon por lotumi bazajn enspezojn por unu jaro kaj prezentas la evoluigon de gajnintoj. La rezultoj estas tre pozitivaj kaj esperdonaj.

Ligilo:

- www.mein-grundeinkommen.de

Frank Merla (ĉ. 250 vortoj)

La svisa eksperimento

Ankaŭ en Svisio estis kaj estas revo pri baza alimentado. En la vilaĝo Rheinau (rajnaŭ, kantono Zürich) ĉiu plenkreskulo super 25 jaroj ricevu ĝin. Nur – mankas mono.

Ekde 2019 la Rheinau-anoj volas testi bazan alimentadon. Ĉiu el la 1300 vilaĝanoj super 25 jaroj povos ricevi ĝin por daŭro de unu jaro. Tion anoncis la vilaĝestraro. Fiksita limtago por vilaĝaneco estis 2018-06-05, do mi ne povas rapide transloĝiĝi. La alimento estos 2500 svisaj frankoj (2200 €).

Tiu baza alimentado ne estas senkondiĉa, kaj ĝi tial ne estas ĉies pensio. Kiu havas enspezojn de pli ol 2500 frankoj, tiu ne povos ricevi la bazan alimenton, aŭ devos repagi parton da ĝi. Tial tiu sistemo estas nur kroma monhelpo por malriĉuloj.

Ĝis nun oni ne scias, ĉu estos mono por la realigo de la eksperimento. Antaŭkalkule oni bezonos tri ĝis kvin milionojn da frankoj, kiujn oni volas havigi al si el publika svarmfonduso (*crowdfunding*).

MLe (ĉ. 140 vortoj)

La finnlanda eksperimento

Antaŭnoto: Mi kompilis la artikolon el diversaj germanaj fontoj. Se estas eraroj en ĝi, vi turnu vin al la germanaj gazetoj. Mi nur kopiis.

En 2003 la meznombraj enspezoj de gefinnoj estis 2372 eŭroj, mi ne trovis pli aktualan nombron.

En 2017 la finna eksperimento pri la ĉiespensio komenciĝis. Per komputero oni tute hazarde elektis 2000 senlaborulojn el entute 200 000. Tiuj 2000 personoj ricevas sen iaj kondiĉoj 560 eŭrojn monate dum la daŭro de la du jaroj **aldone** al la ĝisnunaj enspezoj, do krom senlaborula mono aŭ salajro el nove atingita laborposteno.

Jam en novembro de 2017 la germana gazetaro pli malpli unuanime anoncis plenan sukceson. Ekzemple Juha estis malsana, depresiva ĉarpentisto, la familiaj entutaj enspezoj estis 3000 €. Nun, kun la aldonaj 560 €, li iom post iom resaniĝis kaj fondis novan firmaon.

La 47-jara bakisto Mika fine de decembro 2017 ricevis laborpostenon en komputera firmao. Li nun ne estas senlabora, sed la **senkondiĉan** ĉiespension li plu ricevas. La kaplinio en gazeto legiĝis: Unu jaro de ĉiespensio en Finnlando – kiel senlaborulo estiĝis komputera fakulo.

Estis entute tri ĉiam samaj personoj, kiuj laŭ la gazetaro pruvis la sukceson de la eksperimento.

Tiam, en printempo 2018, la grandega sukceso kolapsis. Oni anoncis, ke la eksperimento ne estos daŭrigata

post la dujara provo. Pri la kaŭzoj mi ne povis legi ion, sed BBC iam raportis, ke mankas 30 - 40 milionoj da eŭroj por la daŭrigo.

MLe (ĉ. 220 vortoj)

Tutmonde

C. Louis Kervran kaj biologiaj transmutacioj

Corentin Louis Kervran naskiĝis la 3-an de marto 1901 en Qimper en Bretonio. Kiel junulo li rimarkis aferojn, kiujn la plenkreskuloj ignoris. Li studis kaj fariĝis fizikista inĝeniero en 1925. El la jaro 1936 konatiĝis esplora laboro de li, en kiu li publikigis, ke la kurento en homa korpo ne obeas al la oma regulo.

Dum la Dua Mondmilito Kevran aktive subtenis la rezistmovadon. 1940 li estis arestita de la Gestapo kaj estis enkarcerigita en Lyon.

De post 1945 li estis gvidanta scienca dungito en francaj ministrejoj. Tie li respondecis la temojn laborsekurecon kaj la protektadon de la loĝantaro kontraŭ radioaktivaj radiadoj. 1966 li emeritiĝis. La franca ŝtato honorigis lin per la kruco de la Honora Legio.

Per sia laboro Kervran deziris pruvi sian sciencon teorion pri la transmutacio de elementoj en biologiaj procedoj. Tiel li volis klarigi plurajn ĝis nun nekompreneblaj faktoj el diversaj sciencaj kampoj (i.a. geologio, medicino, agronomio), ekzemple

- kial kokinoj povas daŭre demeti ovojn kun normalaj kalkŝeloj, eĉ se la nutraĵo entenas neniun kalkon kaj la teniĝo okazas en senkalka ĉirkaŭaĵo;
- kial en masiva kalkŝtono (kemia: kalcia karbonato) neatendite aperas grandaj peĉoj da magnezia karbonato;
- kial ostorompiĝoj pli rapide resaniĝas, se la paciento glutas ekstrakton de la ekvizeto, kiu estas riĉa de silika acido;
- kial kampoj restas fruktodonaj dum jarcentoj kaj produktadas bonan rikolton, eĉ se oni neniam aldonas la elementojn, kiuj estas forprenitaj per la rikolto (ekzemple manganon).

Kaj kromaj frapantaj ekzemploj:

- Se oni kultivas certajn bakteriojn en senfera nutromedio aldonante iomete da mangana salo, jam post mallonga tempo estiĝas fera oksido.
- Ju malpli da kalko troviĝas en gazona grundo des pli forte kreskiĝas la lekantetoj. Tiuj enhavas grandamase kalkon. De kie ĝi venas?
- *Tillandsia usneoides* estas planto, kiu kreskas en subtropikaj regionoj sur kupraj telefondratoj kaj vivas nur de aero kaj pluvo. Cindrigita ĝi enhavas 17 % feron kaj 36% silikan acidon, sed preskaŭ neniun kupron.

- Se grenoj ĝermas en solvaĵo sen kalcio, la junaj plantoj enhavas post kelkaj semajnoj pli ol la trionan kvanton de kalcio komparita kun la kvanto kiun enhavis la grenoj je la komenco.

Kromaj, ege imponaj ekzemploj estas la haŭtdeĵetado de kraboj, la sekiĝo de fruktoj kaj la kapacito de la tervermo.

Tiujn kaj multajn similajn fenomenojn kolektis Kervran kaj kompletigis ilin per propraj esploroj. Ekde 1959 li prezentis siajn ekkonojn al la publiko kaj entute skribis naŭ librojn. Neniu de ili aperis en la germana lingvo. 1972 aperis enkonduka resumo de liaj ideoj kaj eksperimentoj (el tri libroj) en la angla lingvo sub la titolo *Biological Transmutations* (plurfoje publikigita). En la 1960aj jaroj okazis publika debato pri liaj tezoj en Francio, sed ne en Germanio.

1982 Kervran skribis sian lastan libron. Li forpasis la 2-an de februaro 1983.

Por aprezi lian laboron de jardekoj li estis proponita por la Nobelpremio en fiziologio (medicino).

Impona estas la diverseco de la fakaj kampoj, el kiuj Kervran kolektis faktojn, kiuj ĝis nun oni taksis nenormalaj kaj neklarigeblaj. Laŭ opinio de Kervran oni nur povus klarigi ilin per biologiaj transmutacioj. Li ne subtenas la terminojn *normala nuklea fuzio* nek *malvarma fuzio*. Li preferas la esprimon *transmutacio je malalta energio*. Lia labormetodo ĉiam estas rigide scienca. Finfine necesas

denove revigligi la diskutadon pri la rezultoj de Kervran, por ke tiuj estu profunde kontrolata rilate al la valideco.

La esploroj de Kervran sekvas longan tradicion pri scienca laboro, kiu estas traktata en liaj libroj. Ili estas karakterizitaj per strikta scienca metodiko. Ne temas pri alkemio aŭ magio.

Citaĵo el: C. L. Kervran: *Transmutations biologiques et physique moderne*. Paris 1982, p. 24.

Ligilo:

• <http://www.kervran-info.de/leben.html> (Germana fonto)

Tradukis (kun helpo de diligenta samideano) *Klaus Friese*, Hamburg, 2018.(ĉ. 570 vortoj)

Gustav Holst, komponisto

Gustav Holst naskiĝis sub la nomo Gustavus Theodore von Holst je la la 21a de septembro 1874 en Cheltenham, Gloucestershire. Li estis angla komponisto. Lia patro devenas el germana-balta, lia patrino el brita kaj – vastsence – hispana familioj. Li vizitadis la gramatikan lernejon de Cheltenham (Pate's Grammar School¹) kaj lernis ludi pianon kaj violonon.

Ĉe la Royal College of Music² en London li studis komponadon kaj trombonon kaj post tio ekde 1898 laboris kiel orgenisto kaj trombonisto en diversaj orkestroj kaj instruisto pri muziko kaj estiĝis muzika direktoro de la knabina lernejo *St. Paul's* en Brook Green, Hammersmith. Holst aliĝis al la Socialista Klubo de Hammersmith, kondukis ties koruson kaj konatiĝis tie kun sia posta edzina Isobel Harrison.

Holst fine rezignis ludi trombonon kaj dediĉis sin al komponado kaj instruado.

Holst komponis multajn korusajn plur-voĉajn kantoj (*choral part songs*), kantociklojn, operojn kaj orkestraĵojn. Lia plej konata verko estas la orkestra suito³ *La Planedoj* finverkita en 1916. Escepte de *La Planedoj* kaj nemultaj aliaj verkoj lia muziko estis neglektita ĝis la 1980aj jaroj.

Inter 1919 kaj 1923 Holst instruis komponadon ĉe la jam menciita Royal College of Music kaj ĉe la universitato de Reading.

Pro mensa depresio kaj trostreĉiĝo pro laborado li feriadis en Alĝerio. Tio inspiris lin por la verko *Beni Mora*. Korpa kaj mensa malforteco tamen restis longaj akompanantoj de lia vivo. Vojaĝoj kondukis lin tra Eŭropo kaj Ameriko.

Li firme kredis je supernaturaj fortoj kaj okupiĝis pri astrologio. Orientaj religiaj teorioj kaj la doktrinoj de darmo⁴ kaj rekarniĝo forte influis lin.

Je la 25a de majo 1934 li mortis en London en aĝo de 59 jaroj pro koratako post kirurgia operacio je stomaka ulcero.

MLe (ĉ. 360 vortoj)

El la movado

La revuo MONATO

La konata belga revuo MONATO antaŭ nelonge demandis, ĉu mi volas resti en la adresaro de la datumbazo. Mi volis, kaj nun ricevis donacon.

Dum la venontaj tri monatoj mi ricevos la retleteran version de Monato senpage kaj povos »legi dekojn da artikoloj pri politiko, moderna vivo, scienco, lingvo kaj multe pli en flua Esperanto, simple en mia leterkesto«.

La unuaj retleteroj jam alvenis. La unua enhavas artikolon el Italio pri skeleto reaperanta en Pompejo, la dua recenzon de Nikolao Gudskov pri la libro *Legu po-ete. Krestomatio tradukaĵa el pluraj jardekoj*. tradukita de Gerrit Berveling kaj havebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo (FEL). La tria letero raportas pri montogrimpado kaj du nepalanoj, kiuj grimpis sur la monton Everesto en marto 2018.

La mallongaj tekstoj tre taŭgas por legado kaj ekzercado en Esperanto-kurso. Ili estas divers-fakaj kaj helpas ampleksigi la vortostokon de lernanto.

Ligilo: <https://www.esperanto.be/fel/mon/>

MLe (ĉ. 140 vortoj)

La kastelo GREZILJONO

SOMERA PROGRAMO 2018

- 2018-jul-09/27 2-a Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj (7+5+6) kun Perla Miel, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja, Mikaelo Bronŝtejn

- 2018-jul-09/16 4-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso

- 2018-jul-16/22 Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer

- 2018-jul-16/21 Speciala semajno kun kursoj de Esperanto

- 2018-jul-21/27 30-a Internacia E-Konferenco de OSIEK « Esperanto en Artoj »

- 2018-aŭg-11/19 8-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

Oni ricevas redukton de la kotizo, aliĝante 1 monaton antaŭe.

Ligilo: gresillon.org Kontakto: kastelo@gresillon.org
(*El retmesaĝo, ĉ. 70 vortoj*)

Monda premiero de opero en Esperanto en Ĉeĥa Nacia Teatro

La 7-an de aprilo 2018 okazis monda premiero de Esperantlingva opero "Sternenhoch" en la Nacia Teatro de Prago.

Temas pri opero, kies muziko estis komponita rekte laŭ teksto en Esperanto, farita de Miroslav Malovec. Muzikon kaj libreton komponis juna komponisto Ivan Acher. La opero havis surprize grandan sukceson, ne nur de spektantoj sed ankaŭ de kantistoj, kiuj diris, ke Esperanton ili taksas kiel ideala lingvo por opero. Okazis 5 spektakloj kaj ĉiuj estis tute disvenditaj tuj post ĝia premiero dum unu semajno! Eĉ je du monatoj antaŭ la lasta spektaklo oni ne povis aĉeti biletojn.

Pavel Pavliček, gvidanto de la filmo-retejo Verda Stacio havis la eblon videoregistri la tutan spektaklon por arkivo. Bedaŭrinde oni rajtas publikigi nur mallongajn fragmentojn, kaj eĉ tiujn nur post la permeso de la Teatro.

Ligilo:

- Fragmento de la lasta minuto de la opero je la 24-an de junio 2018:
<https://www.youtube.com/watch?v=ZfSmjGuNH1>

I

Laŭ informo de Lingvo-Studio, LS

Norddeutscher Bote

Datenschutz-Grundverordnung (DSGVO)

Die inzwischen in Kraft getretene DSGVO betrifft auch Esperantisten, Esperanto-Klubs, -Vereine und **-Veranstaltungen**. Ich habe versucht, mir einige Einsichten in das Werk zu verschaffen.

Expliziter Hinweis: **Ich bin kein Jurist und gebe keine juristischen Ratschläge**. Das Folgende stellt lediglich eine Meinungsäußerung dar.

Geltungsbereich

Die DSGVO gilt in jedem Fall für alle Personen, die Waren oder Dienstleistungen in Deutschland oder der EU anbieten und unabhängig davon, ob man Mitarbeiter hat. Ich nehme zu Gunsten der DSGVO an, dass es sich um eine Geschäftstätigkeit handelt, in deren Rahmen Waren oder Dienstleistungen bezahlt werden müssen. Anderenfalls wird es schwierig mit dem Angebot von kostenlosen E-Books.

Staatliche Stellen fallen nicht unter die DSGVO. Die Meldeämter übermitteln fröhlich Ihre (Ihre = *viajn*, nicht *siajn*) Adressen an die öffentlich-rechtlichen Medienanstalten. Polizei, Staatsanwaltschaft und

Geheimdienste (wir haben ja auch einige) werden in ihrer Tätigkeit natürlich nicht eingeschränkt.

Esperantisten, die zu keinem Klub und keinem Verein gehören, leben ebenfalls sehr viel ruhiger, weil diese **rein private**, nicht organisierte Esperanto-Tätigkeit nicht unter die DSGVO fällt. Ich hoffe es.

Webseiten

Rein private und Familien-Webseiten sind nicht von der DSGVO betroffen. Leider ist nicht völlig klar, was »rein privat« sein darf. Klar ist allerdings, dass Seiten von Esperanto-Klubs, -Verbänden und -Webshops in den Geltungsbereich der DSGVO fallen.

Fein raus aus der DSGVO und der GDPR (dem entsprechenden europäischen Regelwerk, das nicht direkt, sondern nur über die nationalen Gesetze wirkt) sind alle Betreiber von Webseiten,

- deren Server im Nicht-EU-Ausland liegt,
- deren TLD (Top-Level-Domain, die Buchstabenfolgen hinter dem Punkt) – zum Beispiel .com, .org., .net, .xyz, .ch – nicht in einem EU-Land registriert wurde,
- die sich durch ihre hauptsächliche Sprache – also auch Esperanto – nicht primär an EU-Bürger wenden (was anderenfalls ein Streitfall und ein

einträgliches Geschäft für eifrige Abmahn-Anwälte wäre) und

- deren Hostler die Privatsphäre schützt und den Namen des Domain-Inhabers nicht öffentlich preisgibt. Den Domain-Inhaber kann jedermann über eine Whois-Abfrage schon seit Anbeginn des Internet ermitteln. Browser bieten entsprechende Hilfsmittel als Add-on an.

Kleine, relativ unbekannte Redaktionssysteme für Webseiten (CMS) bieten den Vorteil, dass sie nicht mit Add-ons vollgestopft und Google Analytics oder ähnliche Ergänzungen von vornherein nicht eingebunden werden. Damit bieten sie weniger Angriffsfläche für die DSGVO.

E-Mails

E-Mail-Verkehr: Die unzulässige Übermittlung von E-Mail-Adressen kann geahndet werden. Wer einfach 20 Adressen in das An- oder CC-Feld einträgt und die Mail abschickt, kann sich strafbar machen, wenn er nicht **ausdrücklich** die Erlaubnis hat, dass jedem der Empfänger alle anderen Empfänger-Adressen offenbart werden. **Offene Verteiler** sind künftig zu vermeiden. *Blinde* Empfänger (BCC) erhalten keine fremden Adressen.

Personenbezogene Daten in Unternehmen und Vereinen

Personenbezogene Daten sind alle Informationen, mit denen man eine Person identifizieren kann. Es spielt keine Rolle, ob sie von einem Webformular, einer Visitenkarte oder einem handschriftlich ausgefüllten Anmeldung kommen.

Jeder, der personenbezogene Informationen verarbeitet, muss ein Verzeichnis darüber führen. Aus meiner früheren beruflichen Tätigkeit sehe ich in der gewerblichen Praxis keine Schwierigkeit oder Änderung gegenüber der Vergangenheit. Software, die unter meiner Regie als Projektleiter entwickelt wurde, musste schon immer ausführlich dokumentiert werden. Es gab Arbeitsplatzbeschreibungen, die festlegten, welche Arbeitsschritte an welchem Arbeitsplatz auszuführen waren. Die Festlegung von Datenstrukturen und ihrer Verarbeitung waren Bestandteil der Softwareplanung. Alle Dokumente wurden dem Auftraggeber und gegebenenfalls dem Angestellten übergeben. Für die professionelle Softwareentwicklung werden dafür Ressourcen eingeplant, denn die Dokumentation eines Projekt umfasst erfahrungsgemäß mindestens ein Viertel des Zeit des gesamten Projekts und kostet demzufolge viel Geld.

Kritisch wird es, wenn Software ohne Planung und Dokumentation *auf Zuruf* erstellt wird.

Die DSGVO bestimmt, dass man vorab eine Erlaubnis einholen muss, um personenbezogene Informationen zu erfassen, zu speichern und zu verarbeiten. Für **Kongresse, Seminare** und ähnliche Veranstaltungen sollte man also a) auf der Webseite und b) im Fall einer schriftlichen Anmeldung dick und groß diese Erlaubnis einholen. Tipp: Fotos und deren Veröffentlichung müssen zusätzlich genehmigt werden. Fotos von Minderjährigen veröffentliche man grundsätzlich nicht unabhängig von der Quelle und von einem eventuellen Vorliegen der Erlaubnis der Erziehungsberechtigten.

Die Einwilligung zur Verarbeitung von personenbezogenen Daten kann jederzeit widerrufen werden. Auf die Möglichkeit des **Widerrufs** der Einwilligung muss ausdrücklich hingewiesen werden! Andererseits verlangt der Staat, dass Rechnungen 10 Jahre lang aufgehoben werden. Hier überwiegt das Interesse des Staats!

Es gibt eine Zweckbindung für personenbezogene Daten. Sie müssen richtig und aktuell sein. Deshalb: Personenbezogene Daten nur an einer einzigen Stelle speichern, damit man sie auch nur dort aktualisieren muss. Leider ist das nicht immer einfach. Ich kenne das Problem, weil ich mehrere E-Mail-Konten habe und viele E-Mail-Adressen auf zwei oder mehreren Konten speichere. Privat ist das in Ordnung, aber schon ein Esperanto-Klub muss wissen, welche Daten wo, seit wann und bis wann liegen. Es

gibt eine **Rechenschaftspflicht gegenüber den Aufsichtsbehörden**. Wer eine Software einsetzt, die in der Lage ist, alle personenbezogene Daten einer Person »auf Knopfdruck« als PDF-Datei auszudrucken, ist im Vorteil.

Die (zweckgebundenen) Anmeldedaten zum Beispiel für Kongresse müssen **nach dem Kongress** vernichtet, die Vernichtung protokolliert werden. Es müssen **alle** Anschriften vernichtet werden: elektronische Datenbanken, Anmeldeformulare, Schmierzettel, gegebenenfalls ganze Kontaktgruppen in E-Mail-Verteilern.

Sollen Anschriften der Teilnehmer über den Kongress hinaus verwendet werden, muss der Zweck angegeben und eine Erlaubnis eingeholt (möglichst separate Unterschrift!) werden.

Die Teilnehmerliste in einem *kongreslibro* lässt sich natürlich nicht einfach löschen. Die Anschrift eines Teilnehmers sollte nur aufgenommen werden, wenn er unterschriftlich bestätigt, dass er seine Einwilligung zur Veröffentlichung nicht zurückziehen kann.

Bei handschriftlichen Anmeldungen zu E-Veranstaltungen überprüfe man gegebenenfalls in einem separaten Arbeitsschritt die Richtigkeit der in einen Computer übernommenen Daten!

Unternehmen mit mindestens 10 Mitarbeitern, die personenbezogene Daten automatisiert verarbeiten, müssen einen **Datenschutzbeauftragten** benennen. Ein solcher muss unabhängig von der Unternehmensgröße

auch benannt werden, wenn Daten zur Gesundheit, zum Sexualleben, zur Genetik, rassischen oder ethnischen Herkunft, politischen Meinung, weltanschaulichen Überzeugung, Gewerkschaftszugehörigkeit oder zu strafrechtlichen Verurteilungen erfasst werden. Esperanto-Kongresse, Seminare und ähnliche Veranstaltungen sollten einen Datenschutzbeauftragten **freiwillig** und schriftlich benennen. Dessen Kontaktdaten müssen zum Beispiel auf dem Anmeldeformular und auf der Webseite des Kongresses veröffentlicht werden.

Böse Falle: Schon die Abfrage nach *Herr* oder *Frau* als Anrede ist eine geschlechtsspezifische Information und muss, sofern man eine solche Anrede verwendet, ausdrücklich erlaubt werden.

Es spielt keine Rolle, ob die Mitarbeiter, die personenbezogene Daten verarbeiten, bezahlt werden.

Unsicherheiten

Durch die DSGVO sind viele Unsicherheiten entstanden, die erst im Nachhinein durch Gerichtsurteile (deren jedes eine Einzelfallentscheidung ist!) entschieden werden. Ich habe von Lehrern gelesen, die zu Hause keine Zeugnisse mehr ausgefüllt haben (Zeugnisse enthalten persönliche Dateien) und von Wettkampfergebnissen, die man nicht mehr veröffentlichen darf (persönliche Daten!).

Ahndung

Rechtsverstöße gegen die DSGVO können mit Bußgeldern bis 40 Mio Euro geahndet werden. Auch kleine Beträge in vier- oder fünfstelliger Höhe können Schmerzen verursachen.

Weitere Informationen

- Erste Hilfe zur Datenschutz-Grundverordnung für Unternehmen und Vereine. Bayrisches Landesamt für Datenschutzaufsicht. C. H.Beck: München 2017.
- Kollstein, R.: DSGVO 2018: Datenschutzerklärung Leitfaden und Checkliste - DSGVO Erste Hilfe, allgemeine Informationen und Tipps für Unternehmer. Amazon Media EU S.à r.l. 2018.

R. I. P. ŜHELO

Unter den gegenwärtigen Bedingungen bin ich ganz froh, dass unser früherer Landesverband Ŝlesvig-Holstina Esperanto-LigO (ŜHELO) verdampft ist. Es ist leider nicht voraussehbar, wie die DSGVO sich auf Hobby-Vereine und -Klubs auswirken wird. Der zusätzliche Arbeitsaufwand wird sich jedenfalls **nicht** in Grenzen halten lassen. Jedes verärgerte Vereinsmitglied kann sich an den Datenschutzbeauftragten des Landes wenden und sehr viel Ärger und Probleme produzieren.

In unserem Bundesland können wir unverändert weiter arbeiten, weil wir seit langem ohne Organisation und Struktur lediglich mit privatem Engagement aus meiner Sicht gut gearbeitet haben und so weit gekommen sind, wie es für unsere kleine Schar von Esperantisten möglich ist.

Mortis Marga Spittler

Unsere treue und sehr aktive Sprachfreundin Marga Spittler verstarb am 27. Juni 2018. Sie wird uns sehr fehlen. Ich spreche ihren Angehörigen mein tief empfundenes Beileid aus.

Leterkesto

Pri »Vagas fantomoj«

Klaus Friese el Hamburg skribis:

Bonvole ne komparu pomojn kaj pirojn!

Kie vi legis, ke unu miliono da personoj finis la esperanto-kurson Duolingo? Mi dubas pri tiu granda nombro. Kaj kiom longa aŭ pretendema estis tiuj kursoj? Mi pensas, ke nur malmultaj vizitantoj de la Duolingo-kursoj vere atingis sufiĉe altan nivelon.

En mia Esperanto-klubo mi konas tri, kiuj nun tre bone regas nian lingvon. Sed la plimulto verŝajne neniam kontaktus Esperanto-klubon. Vi kompreneble ne povas atendi, ke la plejmulto de la Duolingo-vizitantoj nun ankaŭ legas esperantlingvajn librojn!

Miaopinie Duolingo estas bona varbilo por Esperanto. Per Duolingo pli multaj homoj estas nun iomete informitaj pri Esperanto. Pro Duolingo kreskis la ŝanco, post kelka tempo, ke Esperantujo eventuale iam ankaŭ kreskos.

Pripensu ankaŭ, ke en Germanio nur malmultaj homoj legas librojn. Mi legis [1], ke 2013 ĉi tie 67% de la virinoj kaj 53% de la viroj aĉetis minimume unu libron. Tiu estas grandega nombro. Sed ĉu ili vere ankaŭ legis ĝin? Kiu povas kontroli la aferon? Kaj, kiom da homoj legas fremdlingvajn librojn? Mi trovis, ke en 2017 [2] ĉirkaŭ 5 milionoj homoj

(ekde 14-jaraĝaj) regule legas librojn aŭ gazetojn en fremdlanda lingvo. Nun serĉu la Esperantistojn! Ili ĉiuj ne formas homogenan populacion, rilate al la lingvoscio. Multaj estas (ofte jam delonge) komencantoj, kaj la aliaj ne ĉiam ŝatas librojn, aŭ ne trovas ion interesan. Ili eventuale ne volas legi tradukitajn librojn, ĉar ili jam konas la enhavon. Aŭ la trovitaj libroj ne estas taŭgaj, ĉar la enhavon ne interesas la leganto.

Krome multaj libroj kaj artikoloj, kiuj aperas en Esperanto, ne havas bonan kvaliton. Mi mem ja spertas, ke ne estas facila afero, skribi ion. Mi ja ne estas profesiulo aŭ fama poeto. Sed samideano ja povas kontakti min por plibonigi miajn 'verketojn'. Ofte estas ja pli facile kritiki ion ol doni plibonigon.

Mi scias nur unu solvon por la priskribita problemo. Nur 'veraj' kaj kompetentaj Esperantistoj rajtas skribi ion en Esperanto. Sed tiu certe malgranda grupo povas atingi kompreneble nur ankaŭ malgrandan grupon. Tiam la kompetentuloj restas inter si mem. Ili estas kvazaŭ *kuiritaj en la propra suko*. Tiam neniu riskus kritiki la alian, ĉar neniu volas esti subtaksata de alia kompetentulo.

Pri »Forgesitaj libroj«

Frank Merla atentigas min:

Kara Michael,

bedaŭrinde ne ĝustas, ke vi kiel sola el la rondo de Osa kaj Daniel konas la de Richard Schulz tradukitan libron "Die verlorene Ehre der Katharina Blum". Mi legis kaj la originalon kaj la version de la esperantisto.

Ipernity blokita en Ruslando

Alvenis informo de Ivar B.:

Hodiaŭ mi deziras informi vin ĉiujn pri tio, ke Rusiaj kontrolaj organoj pri komunikado blokis la retejon ipernity (IMA). Jam dum la lastaj du monatoj mi plu nenion povas publikigi ĉe ipernity. Tre domaĝe!

El la redakcio

Ĝenerale

Tio estas revuo por la esperantistoj en Ŝlesvig-Holstinio, Hamburgo, Mek-Pom-io (=Meklenburgo-Antaŭpomerio), Germanio kaj eĉ la tuta mondo. Ĝi aperos kvaronjare, se mi havos sufiĉon da artikoloj. Se mankos al mi kontribuoj, tiam la gazeto eliros pli malofte aŭ tute ne.

Ĉiu povas kontribui (escepto ĉi-sube). Verku artikolojn pri temoj, kiuj interesas vin, pri viaj hobiaj, okazaĵoj en via urbo aŭ regiono, pri la Esperanto-klubo, pri sociaj temoj. *Nordgermana Heroldo* ne estu pure Esperanta gazeto (da tiuj ni havas sufiĉan nombron).

Ĉu vere inter la miliono da finintoj de la Duolingo-kurso estas neniu, kiu aŭdacas verki mallongan artikolon? Kie estas esperantistoj-ĵurnalistoj, kiuj verkas pri **neesperantistoj** temoj?

Se vi volas faciligi la laboron por mi, tiam vi verku en markdaŭna markolingvo (Vidu la klarigojn per la ligiloj) aŭ skribu en simpla teksto.

Nordgermana Heroldo ne estas ... platformo por politika propagando, personaj atakoj kaj tiel plu. **MI** decidas, kio estas tia.

Venontaj temoj

Afriko

Komputeroj

Mi planas specialan kristnaskan numeron.

Vi povas sendi bildojn por la titolpaĝo: proksimume 1600x1700 pikseloj, nigra-blanka, prefere stridesegnaĵo de urbo aŭ alia loko.

Ligiloj

- <http://t1p.de/ngh> (Nepre uzu tiun adreson, ĝi enhavas alidirektilon. Mi ne scias, ĉu mi povos teni la originan retadreson.)
- http://esperanto-sh.blogspot.de/2017/07/pri-markdauno-markdown_29.html (Pri markdaŭno)
- <http://esperanto-sh.blogspot.de/2014/09/la-markolingvo-markdauno-markdown.html> (Pri markdaŭno)

QR-kodaĵo de la retpaĝo: Skanu ĝin per via smartfono.



MLe (ĉ. 160 vortoj)

Aŭtoraj rajtoj

Mi rezignas pri aŭtoraj rajtoj. Do vi povas laŭplaĉe ĉerpi el la artikoloj, kiuj estas signitaj per *MLe*.

Ni ricevis

Magdeburga Folio

MF estas neregula interreta informilo pri aktualaĵoj el la mondo esperantista. Alvenis per e-poŝto la numeroj 145(45) *Majo-Junio 2018* kaj 146(46) *Julio-Aŭgusto 2018* en la dosierformoj PDF kaj DOC. Dissendas ĝin Dieter Dungert (DDungert@t-online.de).

Elstaras en numero 145 rakonto *Kara Lutek* de Sten Johansson. Pliaj temoj estas inter aliaj: *Eŭropa Civitana Iniciato por Minoritatoj, la 5-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE), Esperanto-Programo de kastelo Grezilojono en 2018, Bernhard Schlink: La Legisto, Promene tra Beletra Almanako 2017, Nederlandlingvaj ĵurnal-artikoloj kaj Amikumu iĝas socia reto.*

Semajno de Enigmoj



SEMAJNO DE ENIGMOJ

Unua gazeto de enigmoj esperante

Semajno de Enigmoj estas la unua gazeto de enigmoj en Esperanto. Ĝi enhavas klasikajn krucvortenigmojn, kriptan kaj silaban krucvortenigmojn, vortoserĉon, rebuson, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn, kaj cetere. Ĉefredaktoro estas Giorgio Denti, ankaŭ prezidanto de Roma Esperanto-Grupo. Abono estas senpaga. La aktualaj numeroj estas dissendataj retpoŝte al la abonantoj. Detaloj ĉe la retejo.

Ligilo:

- <http://www.semajnodeenigmoj.com>

Glosaro / Glossar

1. gramatika lernejo (angle: grammar school) – En la britaj gramatikaj lernejoj oni instruis la latinan lingvon kaj hodiaŭ preparas la gelernantojn por la universitata studado. Tiel ili similas al la germanaj gimnazioj. ←
2. Royal College of Music – Reĝa Kolegio pri Muziko en London. *Kolegio* ĉi tie signifas akademion, altlernejon. ←
3. suito – aro da instrumentaj aŭ orkestraj pecoj ludataj en unu prezentado sen grandaj paŭzoj. ←
4. darmo – En hinduismo kaj aliaj aziaj religioj darmo estas grava principo pri leĝo, moro, kutimoj, etiko kaj moralo. Signifo kaj enhavo estas dependas de la koncerna religio. ←

Kolofono / Impressum

- Nordgermana Heroldo Nº 2 (Juli 2018).
- Elŝuto: t1p.de/ngh.
- Titolpaĝo: Lumturo ĉe Skagerrak, Danlando.
- Kontakto: Michael Lennartz • Inselstraße 30 • D-25946 Wittdün • Germanio • [miclennartz ĉe guglopoŝto.com](mailto:miclennartz@guglopoŝto.com).